Estrara Komuniko EKO 2014-44 sendita en la 19a de septembro

## AMO- 6 la sekva

Tio okazos en Modra-Harmonia, Slovakio, (13-16 nov, 2014) kadre de la aranĝo KAEST (Konferenco pri Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko) kun ĉeftemo: 'Ciferecigo de la Esperanto-kulturo' kaj gvidontoj: Marek Blahuš, Johannes Mueller, Michal Matúšov, Peter Baláž kaj Stefan MacGill (nur enkonduko, kunordigo). Prezoj modestos kaj stipendioj estos je dispono. Vidu ĉe:www.kaest.ikso.net. Okazos kvar sesioj: ĵaŭde ekde 16h, vendrede matene (por ĉiu KAESTano), sabate kaj dimanĉe matene.

## AMO al sia kvara kontinento

AMO-7 okazos en Aneho, Togolando, (27-29 dec, 2014): kun la temo 'Konsciigo en la uzado'. Inter la gvidantoj estos Afantchao-Biakou Ayao Raymond (TG), Agbolo A. Didier (TG), Adjé Adjévi (TG) kaj Mireille Grosjean (CH). Temoj: Kreo kaj gvido de lokaj kluboj, Konstruo kaj redaktado de retejoj, Mastrumo de regiona komisiono, Lobiado(koridora agado).

## Esperanto en Forumo por la Tria Aĝo

Tuj post la Ekonomia Forumo por Centra Eŭropo (vidu mian antaŭan komunikon) okazis en apuda urbo Novy Sącz pol-lingva forumo por la Tria Aĝo, (movado, kie Esperanto aperas regule, i.a. pro projektoj laŭ la programo Gruntvig). La vicprezidanto de UEA estis unu el sep panelistoj antaŭ publiko de ĉ 120 personoj. Li rakontas: "Mi havis ĉ. sep minutojn por interveni, parolante en Esperanto kun sinsekva tradukado de Jolanta Kieres. La aŭdo de fremda lingvo tuj kaptis atenton. Mi skizis tri argumentojn: la lernfaciligan, la kulturajn (propra kulturo + ponto inter kulturoj), kaj la aĝan. Mia antaŭferma frazo "Esperanto estas lingvo, kiun oni povas eklerni ekde ajna aĝo" renkontis spontanan aplaŭdon kaj ŝtormon da intervenoj (pli ol ajna alia panelisto). Konfirmite, ke la plimulto de la intervenoj estis pozitivaj -- kiel same en interparoletoj ekstere poste. Tiom la publiko aktiviĝis, necesis rezigni pri mia konkluda frazo "Unike al Eo, homo en tria aĝo povas atingi saman nivelon, kiel denaska parolanto, kio apenaŭ iam validas por aliaj lingvoj." Tiujn frazojn mi sukcesis tamen diri en televida intervjuo kun Krakova televido, same kun sinsekva tradukado. Ili filmis pli ol kvin minutojn da materialo, aldone Jolanta povis plion aldoni en la pola.

## Filmoj el la 99a Universala Kongreso

Skribas Emiljo Cid: "Jen raporto kun teksto, fotoj kaj filmeto pri la Seminario pri Konsciigo, Informado, Gazetara Kampanjo ĉirkau la UK, Kongresa Ago-tago en Bonaero, kaj ĝeneralaj scenoj de la UK. Cetere, mi filmis multege da kongresanoj, eble VI aperas en la filmo, do kontrolu chu vi aspektis bela ;-)"

http://www.gazetaro.org/2014/raporto

## Reeĥoj el la altalpa AMO

Gvidinto Amri Wandel skribas:

"Miaj prelegoj dum la Itala Kogreso kaj la renumerita AMO-5, kies prezentaĵo estas nun videbla rete:

http://www.slideshare.net/amriw/esperanto-informado-irete

Ĝi povas esti uzita en Esperanto-informado kiel refernco au argumento por plurmiliona takso de E-uzantoj tutmonde. La bazajn liniojn de tiu metodo mi prezentis en la komitata listo jam antaŭ unu jaro kaj duono kaj en *Revuo Esperanto* antaŭ unu jaro. Pli detala kaj science prilaborita versio de tiu tezo aperos (angle) en la lingvistika jhurnalo INDECS komence de 2015. La nuna prezentajho havas ĝisdatigitajn datumojn kaj argumentojn. I.a. ĝi konservative supozas ke nur ĉiu tria *Facebook*-ano kiu pretendas pri E-parolado estas serioza kaj provas taksi nur la E-uzantojn en la interreto. Tio donas ciferon de ĉ. 2 milionoj.

## Rereeĥoj el la altalpa AMO

Reage al la sesio de Sara Spanò, s-ro Enrique Ellemberg sendis la sekvajn tre utilajn retligojn: "Leginte el la ĵusa Seminario pri Aktivula Maturigo (AMO) pri multaj antaŭjuĝoj (aŭ prijuĝoj) pri Esperanto, aŭ pro videbla nescio, mi konstruis retpaĝon por informi pri la valoro de Esperanto. Tiu retpaĝo ekzistas en esperanta, angla, kaj hispana versioj.

20 Kialoj por lerni kaj uzi Esperanton:

http://esperantofre.com/faktoj/kiale.htm

Claude Piron verkis anekdoton pri li mem, pli la valoro de la uzado de Esperanto. Li verkis ĉi tiun rakonton pri lia vivo speciale por mi, la 5-an de januaro, 2006, en la angla:

http://esperantofre.com/book/index.htm#piron

Jen lia traduko en Esperanto:

http://esperantofre.com/book/booke.htm#piron

Mi trovis kelkajn retpaĝojn kiuj rekte respondas al kelkaj el la menciitaj antauxjuĝoj:

For / against Esperanto ? de Remush, Raymond Alexis Pierre GERARD

En la angla, proks. 250 eroj.

http://remush.be/rebuttal

Claude Piron – multlingva, kune kun Esperanto:

http://claudepiron.free.fr/

Psikologiaj reagoj al Esperanto - Claude Piron (en Esperanto)

http://claudepiron.free.fr/articlesenesperanto/reagoj.htm

Nefermitaj leteroj: france, angle, hispane:

http://claudepiron.free.fr/lettresouvertes.htm

Artikoloj en la franca, Esperanto, Angla, Nederlanda, Itala, Portugala kaj multaj aliaj lingvoj:

http://claudepiron.free.fr/articles.htm

Ĉu la tuta mondo suferas pro afazio?

http://claudepiron.free.fr/articlesenesperanto/lingvoj2.htm

Linguistic Communication - A Comparative Field Study

http://claudepiron.free.fr/articlesenanglais/communication.htm

Some Comments on Ignorance about Esperanto by Claude PIRON

http://www.esperanto-sat.info/article607.html

Réponses à certaines questions sur l'espéranto (libro)

http://books.google.com/books/about/R%C3%A9ponses_%C3%A0_certaines_questions_sur_l_e.html?id=bbLLXwAACAAJ

Demandoj kaj respondol

http://claudepiron.free.fr/lettresouvertes/questionsreponses.htm

http://esperanto-france.org/30-questions-reponses-sur-l-esperanto

http://www.esperanto.qc.ca/fr/questions#Foire%20aux%20questions

http://vortareto.free.fr/argumentaire/citations.htm

http://esperanto.24.free.fr/question.htm

Bonaj demandoj – malbonaj respondoj

http://www.esperanto-sat.info/article205.html

Ni jam havas la anglan, kial Esperanto?" (On a déjà l'anglais, pourquoi l'espéranto ?)

http://vortareto.free.fr/argumentaire/pourquoi.htm

## *Datoj por atenti*

La Eŭropa Tago de Lingvoj: la 26an de septembro. En la retpaĝo aperas Esperanto:

http://edl.ecml.at/Portals/33/pdf/learn-languages-ESP.pdf

La Internacia Tago de Instruistoj, la 5an de oktobro

http://www.worldteachersday.org/map/